# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' --- Sceno dek

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la dekan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

Unua parto

1. evidente ------ --------------
2. ĝemelo --------------------
3. lukto --------------------
4. ĝisdata --------------------
5. riproĉi --------------------
6. aventuro --------------------
7. baldaŭ --------------------
8. sakstrata --------------------
9. opinii --------------------
10. sulko --------------------

A. strebo
B. senelira
C. samaĝa gefrato
Ĉ. post longa atendado
D. longa fosaĵo en kampo
E. klare
F. havi starpunkton
G. ene de mallonga tempo
Ĝ. eksmoda
H. ekscita travivaĵo
Ĥ. diri malaprobajn vortojn
I. aktuala

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Ĉi tiu lasta sceno okazas _____________ post la alveno de la duopo al Venuso.**

a) tri semajnojn
b) tri monatojn
c) ses monatojn
ĉ) tri jarojn

**2. La paro evidente pekis produktive, ĉar sur Venuso _________.**

a) survojas ĝemetoj
b) survojas ĝemeloj
c) ili survojas per kameloj
ĉ) ili travivas per karameloj

**3. Ili ĝisdatigis la vortarojn PVV kaj PVIV per ___________.**
a) grandega kartoteko
b) gravurado sur ŝtonaj tabuloj
c) komputilo
ĉ) ŝutelefono

**4. Oskar diris ke pli prognozis ke la venusa aventuro estos ________.**
a) sarkasma
b) sakrilegia
c) saks-angla
ĉ) sakstrata

**5. La tri novaj lingvoj sur Venuso ______**
a) ĉiam pli similas al Esperanto.
b) ĉiam pli malsimilas al Esperanto.
c) estas fandotaj en unu lingvon.
ĉ) estas ĉiuj dialektoj de la angla.

**6. Koojanasquaatsi estas ______**
a) amerik-indiana vorto kaj la titolo de filmo.
b) maoria vorto kaj la titolo de romano.
c) nepala vorto kasj la titolo de poemo.
ĉ) volapuka vorto kaj la titolo de tribestro.

**7. La esprimo „Ni fosu nian sulkon" signifas ke esperantistoj _____.**
a) posedu farmbienojn
b) fidele pluiru laŭ la ĝisnunaj vojoj
c) radikale ŝanĝu ŝiajn agad-direktojn
ĉ) aĉetu pli grandajn fosilojn

**8. La esprimo „Ni fosu nian sulkon" estis unuafoje uzita en 1909 de _______.**
a) Ludoviko Zamenhof
b) Ivo Lapenna
c) Theophile Cart
ĉ) Hector Hodler

**9. La esprimo „Ni fosu nian sulkon" naskiĝis pro la _____.**
a) lanĉo de Volapuko.
b) lanĉo de Esperanto.
c) lanĉo de Ido.
ĉ) lanĉo de rakedo al Venuso.

**10. En la fino la esperantistoj ______**
a) planas sendi kolonion al Venuso.
b) refoje provas trovi kiel eble plej multajn esperantistojn sur la tero.
c) refoje provas trovi kiel eble plej malmultajn esperantistojn sur la tero.
ĉ) decidas ne plu fosi sian sulkon.

**3) MIKSITAJ VORTOJ**

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, kiel ankaŭ nun.*

| | |
|---|---|
| E D U K P R O V I T | ☐ ☐ ☐ _ _ _ _ _ _ _ |
| C E L A S M A M O | ☐ ☐ _ ☐ _ _ _ _ _ |
| P R I R I Ĉ O | ☐ ☐ _ _ _ _ ☐ |
| A S T R A S A K | ☐ ☐ _ _ ☐ _ _ _ _ |
| T U J P L I R O N K E | ☐ _ ☐ _ _ _ ☐ _ ☐ _ _ |
| N E S T O R A R A | ☐ _ ☐ _ _ _ _ ☐ _ |

AACEHHIKLMOQRSSSU

_ ☐☐☐ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Kiu ŝajnas esti grava instruo de ĉi tiu sceno, kompare kun la unua?

_ I _ _ _ _ _ _ _   _ _ _ _ _ _   _ _ _ _ _ _ _ _   _ _ _.

**4) DEMANDOJ**

1. Kiom da Venuanoj estos baldaŭ? Kiel tio okazos (kaj okazis)?
2. Kial Alano diras 'manŋdyatis'? Kion li faris tuj poste?
3. Kiel aspektas la nova lingva ordo sur Venuso?
4. Kion faras Bur kaj Alano por provi kompreni la venusanojn?
5. Kial la nomoj de Krista, Klari kaj Miko subite aperas minuskle meze de la sceno?
6. Iuj vortoj en la sceno estas malfacile kompreneblaj ĉar ili ne estas vere Esperantaj vortoj, kiel 'katastrofiquales'.
   Sed kiu vorto estas komplete nekomprenebla surbaze de kono de Esperanto?
7. Ĉu Oskar vere prognozis ke sakstrata estus la venusa aventuro?
8. Mart diris 'Ni fosu nian sulkon'. Kion signifas tiu esprimo?
   Kio estas ĝia deveno kaj graveco en Esperanto?
9. La esperantistoj decidas ja fosi sian sulkon. Sed kion ili ekfaras konkrete?
10. Kiun konkludon oni povas tiri pri la tuta teatraĵo, precipe per komparo de la unua kaj lasta scenoj?

**5) PARIGU**

*Ligu la du partojn de frazoj el la sceno. Iel ni devas marki la fakton ke estas la lasta ekzerco. Tio postulas ion specialan. Do, ni donu rekordan nombron da nebezonataj fraz-finoj! Perfekte!*

| | |
|---|---|
| 1. Ili evidente pekis<br>2. Survojas<br>3. Ili konstruis<br>4. Ili instruos al la infanoj<br>5. La malsameco<br>6. Estas granda lukto<br>7. Ili devas ĝisdatigi la vortarojn<br>8. Ni fosu<br>9. Mi transdonas<br>10. Kial ne diri | A. ĉiujn tri lingvojn<br>B. ĉiusemajne<br>C. ĉiutage<br>Ĉ. eĉ kompreni la parolon de la venusanoj.<br>D. ĝemeloj<br>E. kreskas de tago al tago<br>F. la fina venk'<br>G. la parolon<br>Ĝ. nian sulkon<br>H. paradokse<br>Ĥ plian interlingvon<br>I. produktive<br>J. tricent dudek<br>K. tunelon sub la Alpoj |

Per tiu ĉi ekzerco ni finas nian serion. Tamen por ne abrupte forlasi vin ni kreis lastan ekzercon por kies solvo vi devos ĉasi literojn en la jam faritaj taskoj. Serĉu la ekzercon "Lasta frazo".
Se necese la solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.